Dulingvaj artikoloj jam dekomence helpis novulojn: "*Sondeur à drague* / Sondilo skrapanta" (1904) de *M. Léger* legiĝas en *Bulletin du Musée Océanographique de Monaco*. Temas pri helpilo ĉe submarfunda arkeologio.

La iniciatinto de nia revuo "Esperanto" *Paul Berthelot* en 1904 lanĉis "Provon de Ĥemia Nomigado en Esperanto". Li uzas sensupersignan "ortografikon". Kontraŭante "tro apriorajn" modernigojn en tiu fako, li adoptas la simplan tradician sistemon. Tamen li sekvas la proponon de *Th. Renard* uzi –id anst. –ur en duopaj kombinoj. Plian komplikaĵon alportis samtema artikolo de tiu *Renard* kaj *R. van Melckebeken* en "Internacia Scienca Revuo", aperinta dum la presado de la "Provo" de *Berthelot*. Li povis ankoraŭ enŝovi noton, ke ties sistemo ne tre diferencas de la lia, kaj ke li eĉ pruntis de ĝi kelkajn detalojn. "Kiel akiritajn de l' leganto" li konsideras la "konerojn de atomeco, elektra ioneco, k.c. de la ŝtofoj." Zorge li evitas "–io" ĉe metaloidoj, rezervante ĝin por la metaloj, escepte de la konataj plumbo, fero, kupro kaj oro. Pri tiuj jonoj oni depresis apartan broŝuron el artikolo de "Scienca Gazeto": En "Pri la teorio de l'Jonoj" *Helte* (1904) klarigas la fenomenon per komparo kun osmozo.

Kaj ankoraŭ pli frua broŝuro "Pri la slavoj" donas historian superrigardon pri ties disvastiĝo en Eŭropo, kun interesaj citoj el antikvaj aŭtoroj. (*P.Mikulov*, trad. *V. Laskin*, 1898). Ni povas nur miri kiel bone en tiel frua stadio oni jam uzis la internacian lingvon, eĉ antaŭ la apero de kelkaj modelaj sciencaj tekstoj en "Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto" (1903), redaktita de nia karmemora *D-ro L.L.Zamenhof*.

Ni tenu la nivelon de nia scienca literaturo samalte!

**Adreso de la aŭtoro**

*Rob MOERBEEK*
*Zwaansmeerstraat 48*
*NL – 1946 AE Beverwijk* / NEDERLANDO

<r.moerbeek@wanadoo.nl>

**Priaŭtora informo**

La aŭtoro (*Haarlem*, 1936) ses jarojn instruis la grekan kaj Latinon, estis oficisto en la CO de UEA (1969-2001), privatdocento pri Esperanto (1978-1998, Amsterdamo). Nun volontulas ĉe UEA (biblioteko, provlegado). Plu instruas kaj korektas tekstojn. Honora membro de ISAE.





# Subteno al eldonado de sciencaj eldonoj: sperto de litoviaj universitatoj

*Dainora GRUNDEY*

*Vilniaus Universitato Kaunas Humanisma Fakultato (VU KHF)*

## Enkonduko

Eldonado estas specifa kampo de komerco. Ĝi entenas tiajn aspektojn kiel produktado de varo, oferto de komplezoj kaj funkcio de klerigado. Tamen la precipa celo de eldonado – same kiel de aliaj kampojn de komerco – estas ricevi profiton. La produktoj de la eldonisto – t.e. la diversaj eldonaĵoj – devas elteni konkurencon de aliaj alternativaj eldonaĵoj, el kiuj la aĉetanto povas elekti. Por la aĉetanto tute aŭ preskaŭ ne gravas, kiu eldonanto kontentigos liajn inform-bezonojn: por ke la eldonaĵo vere estu utila, ĝi devas konformi al veraj bezonoj kaj interesoj de la legantoj. Do, unue la eldonistoj devas koni la aĉetantojn de siaj eldonaĵoj. La bezonoj de ebla eldonaĵ-aĉetanto estu orientanta en la agado de ĉiu eldonisto. Por sukcesa agado tamen ne sufiĉas nur koni la aĉetanton. Ke eldonaĵojn oni sukcesu disvendi kaj la eldonado mem ne estu malprofita, necesas bone pripensi planojn de subvenciado.

Kvankam la precipa rimedo de **subteno** de sciencaj eldonaĵoj estas reklamo, la plej grandan efikon donos la kunordigado de ĉiuj elementoj de **kompleksa subteno**: reklamo, persona disvendo, popularigo kaj stimulo de la disvendo. La signifo de la lasta en pasintaj jaroj multe kreskis. Do, analizante la subvencion de eldonado kiel starpunkton oni devas elekti ĝuste la **stimulon de vendado**.

Tamen ĉiuj streboj disvendi la varon kaj ricevi profiton ne devus limiĝi per iu kutima skemo. La strukturo kaj ĉiuj decidoj pri kompleksa subteno de eldonado devus esti konstante trarigardataj, rimarkataj novaj tendencoj, kaj oni devus strebi konscii (kaj kiel eble aktive refari) neefikajn manierojn de disvastigado kaj agojn de subtenado.

La celo de tiu ĉi artikolo estas analizi specifaĵojn de la eldonado en litoviaj universitatoj. La bazo de metodologio estas kompara analizo, metodoj de sinteza ĝeneraligado.

## 1. Kvanta analizo de sciencaj eldonoj en Litoviaj universitatoj: esploro de perspektivoj

Por leganto de sciencaj eldonaĵoj ne gravas, kiu eldonisto kontentigos liajn bezonojn. Do, scienca eldonaĵo – kiel specifa produkto – devas elteni konkurencon de multaj alternativaj eldonaĵoj, el kiuj la aĉetanto povas elekti. Samtempe la eldonisto de sciencaj eldonaĵoj, dezirante substreki tiujn aŭ aliajn avantaĝojn de siaj propraj eldonaĵoj kaj tiamaniere allogi pli da eblaj aĉetantoj – devas pli bone konatiĝi kun la aktuala merkat-situacio pri sciencaj eldonaĵoj.

Celante ekscii, kian pozicion okupas sciencaj eldonaĵoj de VU KHF kompare kun eldonaĵoj de aliaj litoviaj universitatoj unue necesas trarigardi la komunan situacion pri eldonado en litoviaj universitatoj. Ĉar VU KHF estas nur aparta fakultato de *Vilnius*-universitato, kaj ne havas propran eldonejon, ne eblas ĝin opinii samaranga kun aliaj grandaj universitatoj de Litovio, kiuj havas proprajn eldonejojn kaj ĉiujare eldonas multegon da eldonaĵoj. Por ke la trarigardo estu en la sama nivelo, ni uzos kiel kriterion por elekti eldonaĵojn la sekvajn studobjektojn: ekonomio kaj manaĝerado, financoj kaj librotenado, filologio, filozofio kaj politologio, ankaŭ matematiko kaj informadiko. Elektante la sciencajn branĉojn oni atentis la instruatajn studobjektojn en la fakultato.

Por la trarigardo estas elektitaj kvar plej grandaj universitatoj de Litovio: *Vilnius* universitato (VU), *Vytauto Didžiojo* universitato (VDU), *Kaunas* teĥnologia universitato (KTU), ankaŭ *Klaipėda* universitato (KU) kaj Vilnius Universitato, Kaunas Humanisma Fakultato (VU KHF). (Vilnius Universitato Teĥnika Universitato *Gediminas* la liston ne eniris, ĉar la ĉefaj studdirektoj de tiu universitato tute malsamas kun la studobjektoj de VU KHF.)

Por sisteme bildigi la situacion de eldonado de sciencaj eldonaĵoj en litoviaj universitatoj – laŭ la menciita kriterio – oni prezentas datumojn pri sciencaj eldonaĵoj, eldonitaj en litoviaj universitatoj en la jaro 2001. La datumojn ricevitajn, per uzo de unueca datumbazo de sciencaj publikigaĵoj kaj de retpaĝoj de la universitatoj, montriĝas en Tab. 1.



| VU | KU | VDU | KTU |
|---|---|---|---|
| Monografaĵoj | | | |
| 13 | 4 | 1 | 5 |
| Lernolibroj por studentoj | | | |
| 8 | - | 2 | 2 |
| Instruaj libroj | | | |
| 2 | 4 | - | 26 |
| Kolektoj de sciencaj artikoloj | | | |
| 19 | - | 6 | 10 |
| Entute: 42 | Entute: 8 | Entute: 9 | Entute: 43 |

**Tab. 1**: Kvanta analizo de sciencaj publikigaĵoj, eldonitaj en litoviaj universitatoj en 2001

Fontoj formitaj de la aŭtorino laŭ

***Vilniaus universitetas* (VU).** Mokslinių leidinių duomenų bazė. [Interaktiva]. Ligo en interreto < http://vu.library.lt:4505/ALEPH>.
***Klaipėdos universitetas* (KU).** Mokslinių leidinių duomenų bazė. [Interaktiva]. Ligo en interreto < http://ku.library.lt:4505/ALEPH>.
***Vytauto Didžiojo universitetas* (VDU)**. Mokslinių leidinių duomenų bazė. [Interaktiva]. Ligo en interreto < http://vdu.library.lt:4505/ALEPH>.
***Kauno technologijos universitetas* (KTU)** inių leidinių duomenų bazė. [Interaktiva]. Ligo en interreto < http://ktu.library.lt:4505/ALEPH>.

(Ĉiuj institucioj konsultitaj la 15-an de aprilo 2002)

Dezirindas substreki, ke la datumoj, prezentitaj en la Tab. 1 ne plene respegulas la realan situacion de eldonado de sciencaj eldonaĵoj en litoviaj universitatoj. Ĉar formante tiun ĉi tabelon oni apogiĝis sur la kriterio, apartigi nur tiujn sciencajn branĉojn, kiuj konformas kun la ĉefaj studobjektoj de VU KHF (tie ĉi oni do prezentas nur malgrandan parton de la eldonaĵoj, eldonitaj en 2001). Tamen ĝuste pro tiu ĉi elekto oni povas kompari la eldonan agadon de VU KHF kiel aparta fakultato, kiu ne havas propran eldonejon kun sama eldon-agado kiel la plej grandaj universitatoj de Litovio (kiuj ĉiujare eldonas amason da sciencaj eldonaĵoj pri esploroj el diversaj alifakaj sciencobranĉoj).

Resumante la datumojn de Tab. 1 oni povas fari komparan kvantan analizon de sciencaj eldonaĵoj en litoviaj universitatoj.

## 2. Trarigardo de la produktado de sciencaj eldonaĵoj en VU KHF kaj la praktiko de ĝia subteno

Por pli bona kompreno en Tab. 2 estas prezentata la dinamiko de la eldonado en VU KHF.

| Monografaĵoj | | | Lernolibroj | | | Instruaj libroj | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| '99 | '00 | '01 | '99 | '00 | '01 | '99 | '00 | '01 |
| 1 | 2 | 1 | - | 2 | - | 4 | 2 | 1 |

| Kolektoj de sciencaj artikoloj | | | Konferencaj aktoj | | | Aliaj libroj | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| '99 | '00 | '01 | '99 | '00 | '01 | '99 | '00 | '01 |
| 3 | 3 | 6 | - | 1 | 1 | 2 | 2 | 1 |

**Tab. 2**: Dinamiko de la produktado de sciencaj eldonaĵoj en VU KHF de 1999 ĝis 2001

La plej ofte aplikata disvastigo de eldonaĵoj de VU KHF estas pertelefona vendado. La oficisto respondeca pri disvastigado de la eldonaĵoj telefonas al diversaj klerigaj institucioj kaj librovendejoj kaj informas pri novaj eldonaĵoj, konatigas kun iliaj enhavoj kaj proponas akiri eldonaĵojn, eldonitajn de la fakultato. Por interesitoj oni fakse liveras pli detalajn informojn pri la eldonaĵoj, ekz. oni sendas enhavtabelojn kaj mallongajn resumojn.

La precipaj aĉetantoj de publikigaĵoj eldonitaj de VU KHF estas klerigaj institucioj (t. e. diversaj universitatoj, institutoj, kolegioj k. s.). Ili aĉetas sciencajn eldonaĵojn por ekipi siajn studentojn kaj instruistojn per scienca literaturo, plenigi bibliotekojn per novaj eldonaĵoj. Nuntempe la ĉefa aĉetanto de eldonaĵoj de la fakultato estas *Kaunas* Teĥnologia Universitato (KTU). Disvastigante la eldonaĵojn oni fruktedone kunlaboras ankaŭ kun *Kaunas* kolegio, *Kolping* kolegio k. a.

La plej konata maniero por disvendi librojn al unuopaj aĉetantoj estas vendado en librovendejoj. Librovendejojn oni povas priskribi kiel netajn vendistojn, vendantajn librojn — plej ofte po unu ekzemplero — rekte al la legantoj. Elektante librovendejojn por kunlaboro, oni nepre devas konsideri la lokiĝon de la librovendejo kaj la sortimenton de la libroj.



Eldonaĵojn de VU KHF nuntempe disvendas la librovendejoj *Humanitas* (*Vilniaus g. 11*) kaj *Septynios vienatvės* (*Daukšos g. 31*). Ambaŭ librovendejoj troviĝas ne malproksime de la fakultato, t.e. en strategie taŭga loko, kie ariĝas ĉefaj fluoj de potencialaj aĉetantoj (t.e. membroj de la universitata komunumo). [1)]

En 2002 VU KHF prezentis kaj vendproponis siajn eldonaĵojn partoprenante en la ekspozicio *Kaunas 2002* (okazinta en *Kaunas*, la 16-18an de majo) kaj en la ekspozicio *Mokslas 2002* („Scienco 2002", okazinta en *Vilnius* la 21-24an de majo). Tio ja estis ĝustatempa respondo al la nuntempaj problemoj kaj aktualaĵoj de scienco, klerigado, studoj, ankaŭ prioritatoj de la ŝtata politiko en tiuj ĉi kampoj. En la ekspozicioj partoprenis 94 institucioj pri Scienco kaj Klerigado (Litoviaj ŝtataj institutoj, ŝtataj universitataj altlernejoj, ŝtataj neuniversitatj altlernejoj, privataj altlernejoj, eksterlandaj universitatoj, institucioj de klerigado, prezentantaj internaciajn studprogramojn). La ekspoziciojn vizitis 16 mil personoj – ne venis hazardaj vizitantoj sed la plejmulto el ili estis fakspecifa publiko.

Interalie, parto de la sciencaj eldonaĵoj de la fakultato estas disvendata tra katedroj de la fakultato kaj per iniciatoj de la aŭtoroj mem, kiam ili siajn eldonaĵojn disvendas rekte al la legantoj. Nuntempe la plej popularaj kaj la plej novaj sciencaj eldonaĵoj estas reklamataj en retpaĝo de *Vilnius* universitato. Ĉar la retpaĝo estas informcela kaj edukcela, pro prezento de la eldonaĵoj (reklamo) en ĝi oni ne devas pagi. Nuntempe oni krome refaras kaj plibonigas la retpaĝon de la fakultato, en kiu oni planas ankaŭ meti datumojn pri sciencaj eldonaĵoj, eldonitaj en VU KHF. Tie ĉi oni povos trovi ne nur la titolojn kaj priskribojn de la plej novaj kaj plej popularaj eldonaĵoj de VU KHF, sed ankaŭ de ĉiuj sciencaj eldonaĵoj de la fakultato, kiujn oni ĝis nun povas aĉeti. Pere de ligoj el la retpaĝo de VU KHF oni povos atingi la retpaĝojn de la fakultataj periodaj eldonaĵoj *Transformations in Business and Economics* kaj *Respectus philologicus*, en kiuj interesitoj povos pli detale konatiĝi kun la eldonaĵo mem (ĝia enhavo kaj priesploritaj temoj), la redakta kolegio kaj postulo por publikigotaj artikoloj. En la paĝaro troviĝas ankaŭ arĥivo de pli fruaj numeroj kaj temoj de planataj numeroj.

........

1) Ĉiuj de VU KHF eldonitaj sciencaj eldonaĵoj estis liveritaj ankaŭ al la librovendejo de *Vilnius* universitato *Litera* (*Vilnius Universiteto g. 3*). en kiu oni disvendis eldonaĵojn de ĉiuj fakultatoj de la universitato. Bedaŭrinde la agado de tiu ĉi librovendejo per Senata decido de VU en printempo de 2006 estas haltigita.

## 3. Konkludoj kaj proponoj

Resumante la nunan situacion pri eldonado, disvendo kaj subteno de sciencaj eldonaĵoj en VU KHF oni povas konkludi: la amplekso de la eldonkvantoj en la fakultato ne estas granda, tamen VU KHF inter la por la esploro elektitaj universitatoj (se apogiĝi sur la donitaj kriterioj) okupas konsiderindan pozicion kaj iom postlasas KU kaj VDU. En 2001 la eldonaĵoj de VU KHF inter aliaj universitatoj formis 9 % (10 eldonaĵoj). Samatempe KU kaj VDU postrestis tre malmulte, konforme 7 % resp. 8 % (t. e. ili produktis 8 kaj 9 eldonaĵojn). En la eldonado de sciencaj publicaĵoj (en la kampoj laŭ elektitaj kriterioj) antaŭas VU kaj KTU: la eldonaĵoj de tiuj ĉi universitatoj konformas al po 38 % en konkurenca merkato. (VU kaj KTU produktis 42 resp. 43 eldonaĵojn).

Planante la eldonadon de sciencaj eldonaĵoj en VU KHF oni konsideras la principojn de divido de respondeco, kontentigo de bezonoj de uzantoj, planado de eldontempo kaj planado de apartaj eroj de eldonado. La sciencaj eldonaĵoj de VU KHF nun estas disvendataj en *Humanitas*, *Septynios vienatvės* (en *Kaunas*). Oni ankaŭ disvendas dum ekspozicioj (en 2002 VU KHF partoprenis en *Kaunas 2002* kaj *Mokslas 2002*). Parto de la eldonaĵoj estas disvendata en katedroj de la fakultato kaj per iniciatoj de la aŭtoroj mem. La plej multon oni vendas al aliaj instancoj de klerigado (KTU, *Kaunas* kolegio, *Kolping* kolegio k. a.).

Por subteni sciencajn eldonaĵojn de la fakultato, oni aplikas du faktorojn: reklamo kaj instigo de disvendo. Tamen la ebloj de tiuj ĉi rimedoj estas preskaŭ eluzataj, nuntempe oni uzas nur reklamon en la retpaĝo de VU kaj per prezentado de la eldonaĵoj dum ekspozicioj.

Trarigardinte la aplikitajn rimedojn de subteno, oni povas konkludi, ke oni uzas ilin ne sufiĉe. Pro tio oni proponas tiujn ĉi rimedojn: la proponata ĉefa celo de la instigoj por eldonaĵoj de VU KHF estas pligrandigi la amplekson de vendoj. Por estonte pli bone realigi la planon pri altigita disvendo de VU KHF-eldonaĵoj oni proponas uzi la sekvajn gravajn rimedojn: **reklamo** – anoncoj en gazetaro, per poŝto, en interreto; **informo** – per faldfolioj, afiŝoj ĉe universitataj anonctabuloj, inform-stando dum laŭokazaj ekspozicioj; **rabato** – laŭ (aĉetita) kvanto, por malnovaj eldonaĵoj, laŭ antaŭmendo okaze de novaj eldonaĵoj ("kuponoj").



### Listo de uzita literaturo


Vilniaus universitetas. *Mokslinių publikacijų rūšys*. [Interaktyvus]. [Žiūrėta 2002 m. kovo 25d.]. Prieiga per internetą: < http://www.mokslas.cr.vu.lt/Publ1.htm >.

Vilniaus universitetas. *Mokslinių leidinių duomenų bazė*. [Interaktyvus]. [Žiūrėta 2002 m. balandžio 15d.]. Prieiga per internetą < http://vu.library.lt:4505/ALEPH>.

Klaipėdos universitetas. *Mokslinių leidinių duomenų bazė*. [Interaktyvus]. [Žiūrėta 2002 m. balandžio 15d.]. Prieiga per internetą < http://ku.library.lt:4505/ALEPH>.

Vytauto Didžiojo universitetas. *Mokslinių leidinių duomenų bazė*. [Interaktyvus]. [Žiūrėta 2002 m. balandžio 15d.]. Prieiga per internetą <http://vdu.library.lt:4505/ALEPH>.

Kauno technologijos universitetas. *Mokslinių leidinių duomenų bazė*. [Interaktyvus]. [Žiūrėta 2002 m. balandžio 15d.]. Prieiga per internetą <http://ktu.library.lt:4505/ALEPH>.

Vilniaus universitetas. *Kauno humanitarinio fakulteto leidiniai*. [Interaktyvus]. [Žiūrėta 2002 m. gegužės 5d.]. Prieiga per internetą: <http://www.info.vu.lt/skelbimai/pristatymai.htm>.

Vytauto Didžiojo universitetas. *Periodiniai leidiniai*. [Interaktyvus]. [Žiūrėta 2002 m. gegužės 15d.]. Prieiga per internetą: < http:// www.vdu.lt/leidiniai/ >.

Klaipėdos universitetas. *Periodiniai leidiniai*. [Interaktyvus]. [Žiūrėta 2002 m. gegužės 15d.]. Prieiga per internetą: < http:// www.ku.lt/leid/leidiniai/2001/ >.

Kauno technologijos universitetas. *Periodiniai leidiniai*. [Interaktyvus]. [Žiūrėta 2002 m. gegužės 17d.]. Prieiga per internetą: < http:// www.ktu.lt/lt/index2_6.html >.

Vilniaus universitetas. *Periodiniai leidiniai*. [Interaktyvus]. [Žiūrėta 2002 m. kovo 12d.]. Prieiga per internetą: <http://www.mokslas.cr.vu.lt/konfe/perio.htm >.

Takas.lt. *Reklamos internete įkainiai*. [Interaktyvus]. [Žiūrėta 2002 m. gegužės 10d.]. Prieiga per internetą: <http://reklama.takas.lt/kitos.php>.

UAB "Rodiklis". *Reklaminių bukletų gamybos kainos*. [Interaktyvus]. [Žiūrėta 2002 m. gegužės 25d.]. Prieiga per internetą: <http://www.rodiklis.lt >.

Lietuvos knygynai. [Interaktyvus]. [Žiūrėta 2002 m. gegužės 13d.]. Prieiga per internetą: <http://www.sociumas.lt/Lit/knygos/knygynai.asp>.

Paroda "Mokslas 2002" [Interaktyvus]. [Žiūrėta 2002 m. gegužės 30d.]. Prieiga per internetą: <http://www.litexpo.lt>.

UAB "Ekspozicijų centras". Parodų sąrašas. [Interaktyvus]. [Žiūrėta 2002 m. gegužės 30d.]. Prieiga per internetą: <http://www.expo.lt>.


### Adreso de la aŭtorino


*Doc. dr. Dainora* G*RUNDEY*
*Vilniaus universiteto Kauno humanitarinis fakultetas*
*Muitines g. 8, LT – 44280 Kaunas* / LITOVIO
<mokslo.prodekanas@vukhf.lt>


### Priaŭtora informo

Vicdekanino de *Vilnius* universitato *Kaunas* humanisma fakultato (VU KHF) pri scienco kaj internaciaj rilatoj. Fondintino de internacie recenzata eldonaĵo de sciencoj *Transformations in Business and Economics* (http://www.transformations.khf.vu.lt) (2002) kaj anstataŭantino de la ĉefredaktoro. En 2005 la aŭtorino fondis la internacian elektronikan eldonaĵon de sciencaj laboroj *IJORTISS* (http://ijortiss.vukhf.lt) kaj estas ĝia ĉefredaktorino. Samajare ŝi ankaŭ fondis internacian reton *INYRSS* (*International Network of Young Researchers in Social Sciences*) kaj estas ĝia ĉefkunordigantino. Interesoj de sciencaj esploroj: vendado kaj subvenciado, emocia vendado, interkultura manaĝerado, integrita komunikado de vendado, regado de vara signo, enmerkatigo de kulturo kaj strategia regado de vendado.